FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL + TRIMONATA BULTENO

N° 60A / 61A (NOVA SERIO) N° 145A / 146A

AÙTUNO - VINTRO 1982A.



REDAKTAS : JEAN GIBAUX 28 RUE RAOUL DUFY 76600 LE HAVRE.
ELDONITA, EKSPEDITA DE :
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE . C.C.P. N° 283 40 H ROUEN.



KOTIZOJ : Minimuma kotizo = 20 Fr. Subtena ek de 30 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno, sen membreco = 20 Fr.


"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"

## NOVA VIZAĜO POR LA ESTRARO DE U.N.E.

Depost ok jaroj, nur viroj estis videblaj en la gvidanta kolegaro kaj mi ĵuras sur la Verda Stelo, ke ne temis pri rasismo !

Krome, estis delikate paroli pri "juneca ŝipo" : la gvidantoj deĵoris de tiom da jaroj !

Nu ! tri ge-junuloj eniris en la estraron :

Silvia CARON Katerina DOMINGO Paskalo MICHEL

Ni aplaùde salutu al niaj novaj ge-gvidantoj kun bondeziroj por fruktodona laboro.

Ja, se Etretat montriĝis kontentiga por la ĝenerala kunveno, oni povas fieri pri la spektinda kultura vesperaĵo kiun TESPA oferis al ni. Jen majstra elmontro de la vivanteco de la lingvo, fare de aktoroj kaj kantistoj !

Konstatinde ke la dis-semitaj provincaj grupoj kaj grupetoj , havas nur maloftan okazon orele kaj buŝe kontakti kun kutimaj uzantoj de Esperanto : la kunestado kun eternaj komencantoj ne estas taùga medio por perfektiĝi en la arto uzi la lingvon ; des pli frape oni admiras la esprimplenon de la teatranoj kiuj, cetere, atingas perfekton en sia aktora arto ....

Ni kaptu la okazon por memori ke tiu lingvo kiun ni lernis -ilo admirinda por komuniki transe de nia lando - bezonas, kiel ĉiuj iloj, utiligon por konservi sian econ : se ni ĝin ne uzas, ĝi rustiĝos. Kontraùe, per konstanta uzado (lego, skribo, [illegible]parolo), ni poluros ĝin iom post iom, kaj akiros tiun elegantan uz-manieron kiu ne estas nura privilegio de minoritato.

JOHANO ĴIBO


Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais.
Le Gérant : Pierre LEMARCHAND - Dépot Légal 4ème trimestre 1982.

# ĜENERALA KUNVENO DE U.N.E. KAJ FEDERACIO EN ETRETAT LA 04.10.1982.

MALFERMO KAJ SALUTOJ : Sro QUILLAUD malfermas la kunvenon je la 9h45, esprimante sian ĝojon pro la pli granda nombro da partopre-nantoj ol kutime, venintaj el la 5 departementoj. Li bedaŭras ke la 3 Angloj aliĝintaj ne povis veni, kaj salutas la Kongreson. Fine li senkulpigas s-ojn HUET, JOUIS, LEGRET kaj LEBEC, kaj me-morigas la celojn de U.N.E. : regrupigi ĉiujn Normandajn Esperan-tistojn sendepende de aparteno al aliaj naciaj aŭ internaciaj aso-cioj.

SALUTON DE J.E.F.O. : F-ino AMBLES salutas la kongreson nome de jefo kaj klarigas la celojn kaj funkciadon de tiu organizo. Si ankaŭ petas ke ĉiu instruanto de E° sendu sian adreson al ŝi : 51 rue Blanche, 75009 Paris.

DANKON : Nia Asocio dankas al S-ino MICARD, kiu ĉeestas la kunve-non, kies edzo fondis antaŭ 30 jaroj Grésillon.

AGADRAPORTO : (S-ro POTTIER) Kvar komitatkunvenoj okazis dum la jaro : en Lisieux la 3an de Oktobro, en Le Havre la 5an de Decembro en Etretat la 13an de Marto, kaj en Grand Quevilly, la 16an de Junio. Dum tiuj kunvenoj oni ĉefe pritraktis la organizadon de la ĝenerala kunveno, kaj la problemojn de la bulteno, starigitaj ĉefe pro la plialtigo de la poŝtaj tarifoj, kaj pro la rifuzo de la agnosko de nia bulteno fare de "Commission Paritaire de Presse". Oni ankaŭ diskutis pri la leĝo-propono favora al E°, pri invito al la Normandaj Esperantistoj fare de la grupo en Southampton, pri la kursoj de U.F.E. kaj pri ĝia telefona reto .......

FINANCA RAPORTO : (S-ro Lemarchand))En kaso nuntempe : 3 487,68 Fr La mono devenas ĉefe el la kotizoj kaj el la bonhavo de la kongreso. La elspezoj estas ĉefe la bulteno kaj la kulturaj elspezoj (Teatraj vesperoj dum la kongresoj). La lasta bulteno havis 277 ekzemplerojn el kiuj 213 estis senditaj al Normandoj, 13 ekster Normandio, 7 al eksterlando, 31 al E°-organizoj, kaj 13 estis uzataj por la leĝa depono. 113 personoj pagis sian kotizon ĉi jare. Oni klarigas kial la sendo de la bulteno estas multekosta, ankaŭ pri la teknikaj problemoj, kaj la ĉeestantaro pridiskutas ilin. Post propono ke oni ŝparu monon eldonante nur 3 numerojn jare, la plimulto preferas 4 numerojn. Sro GIBAUX petas ke la grupoj sendu akurate siajn in-formojn kaj Sro ROUSSEAU proponas ke la kotizo estu plialtigita. (20 f. anstataŭ 15 f.)

*Ambaŭ raportoj estas unuanime akceptitaj.*

RAPORTOJ DE LA GRUPOJ :

ROUEN : La grupo akceptis aŭstralianojn; kunveno kaj prelego en la Junuldomo. Kursoj en Grand Quevilly kaj en M.J.C. Rouen Gauche. Ekspozicioj dum politikaj festoj.

LE HAVRE : La grupo vojaĝis al Southampton. Du kursoj : unuagrada ĉe Junula Kulturdomo (Sro CHALM) kaj ĉe la Naturamikoj (Sro MARY) kun 6 lernantoj. Konversacia kunveno merkrede (Sro CHALM). La mo-nataj kunvenoj estas programitaj por la tuta jaro. La grupo serĉas dokumentojn por verki sian historion.

.../...

YVETOT : 2 kursoj, elementa kaj progresiga ambaŭ kun lernanto. La monataj kunvenoj ne okazis, sed la Reĝa kuka Festo, kun ĉeesto de Jack LE PUIL, grupigis 40 partoprenantojn. La grupo ricevis vizitojn de Norvego kaj Japanino.

CAEN : unuagrada kaj duagrada kursoj de Sro ANGENAULT (la dua kun 10 personoj) Kunvenoj ĉiumonate. Membroj de la grupo sukcesis prezen--ti 2 horan programon pri E° ĉe la loka libera radio "Radio Adel". 3 personoj telefonis dum la elsendo. La radio stacio nun pretas elsendi E°-kurson.

LISIEUX : 15 membroj, sed neniu aktiveco.

DOMFRONT :ĉiusemajnaj kunvenoj, sed ne ĉiuj povas veni, kaj la var--bado estas malfacila. la grupo havas planojn por la Jaro de la Komunikado.

DIVERSAJ DEMANDOJ :

KONGRESO EN ORLEANS : SRO ROUSSEAU partoprenis ĝin kaj trovis ĝin interesa.

FEDERACIO : LA ANOJ NUN PAGAS REKTE AL U.F.E. La Federacio decidis donaci 300 fr. al UNE. La agado estas preskaŭ nula. La Komitato kutime kunvenas komune kun tiu de UNE.

TELEFONJARLIBROJ : ĈIU INSTRUANTO DE E°, KIU HAVAS TELEFONON, RAJTAS ENSKRIBIĜI EN ĜIA PROFESIA PARTO KIEL "PROFESORO DE ESPERANTO".

ESTONTAJ RENKONTIĜOJ : la ĉeestantaro diskutas pri la avantaĝoj de printempo kaj aŭtuno kaj konkludas ke oni decidu pri datoj de renkontiĝoj laŭ la cirkonstancoj.

VOĈDONOJ Eliranta triono : Sroj DELAUNAY kaj LEMARCHAND. Aliaj kandidatoj : Catherine DOMINGO, Michel PASCAL, kaj Sylvie CARON ĉiuj estas elektitaj kaj / aŭ reelektitaj.
Kontreviziistoj : Sroj JOUVIN kaj MENDES.

*Fino de la kunveno : je la 12h30.*

=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*==*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=

I.E.K.A. : (INTERNACIA ESPERANTO KLUBO AŬTOMOBILISTA)

Ni memorigas ke tiu asocio celas apliki Esperanton al la aŭto-medioj. ĝi produktas sunprotektilon por aŭtomobiloj, tio estas bona propagando por E°, ĉar oni legas sur ĝi : "ESPERANTO LINGVO INTERNACIA" ; la asocio preparas nun la eldonon de fak-vortaro. Membrokotizo : unufoje 4 dolaroj, aŭ egalvaloro, pagebla al Sro GUILLAUME 66 De Grasse Village 78810 FEUCHEROLLES.

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

UNUIĜO DE LA NORMANDAJ ESPERANTISTOJ (U.N.E.) "ŜLOSILAJ PERSONOJ"

| | | |
|---|---|---|
| ANGENAULT | Gilbert | 23 route d'Asnelles. 14114 VER SUR MER.(22.22.86) |
| BERLOT | Pierre | 6 square Lyautey. 76130 MONT SAINT AIGNAN (74.05.99) |
| BESSIERE | Albert | 28 rue Camille St Saens. 76000 ROUEN.(89.65.34) |
| BETTENCOURT | Gilbert + Line | BOUVILLE. 76360 BARENTIN. |
| BONNET | Sylvie | 32 rue de la Madeleine. 27700 LES ANDELYS.(54.31.09) |

.../...

UNUIĜO DE LA NORMANDAJ ESPERANTISTOJ - "ŜLOSILAJ PERSONOJ" SEKVO :

| | | |
|---|---|---|
| CARON | Sylvie | 44 rue Gustave Lennier. 76600 LE HAVRE. (43.64.69) |
| CHALM | Alain | 8 place Albert René. 76600 LE HAVRE. (21.10.25) |
| DELAUNAY | René | 144 bis rue du Renard. 76000 ROUEN. (70.16.70) |
| DOMINGO | Catherine. | Ecole Guy de Maupassant, rue Galliéni 76580 LE TRAIT. (91.71.21) |
| EVRARD | | 6 rue des Aubépines. 76420 BIHOREL. (60.56.17) |
| GAILLARD | Annie | 12 rue Guérot. 76500 ELBEUF. |
| GIBAUX | Jean | 28 rue Raoul Dufy. 76600 LE HAVRE. (42.18.66) |
| GUERRE | France | 14 rue Poussin. 76000 ROUEN. (07.41.81) |
| HARDY | Daniel | Lycée Augustin Fresnel. 27300 BERNAY. |
| HUET | Maurice | 63 boulevard François 1er. 76600 LE HAVRE. |
| JOUIS | Edgard | 621 rue Georges Mugnier. 76230 BOISGUILLAUME(71.05.14) |
| JOUVIN | Pierre | 14 rue Thiers. 76120 GRAND QUEVILLY.(69.77.20) |
| LEGRET | Alphonse | 14 rue des Sablonnières. 14500 VIRE. |
| LEGROS | André | YPREVILLE BIVILLE. 76540 VALMONT. |
| LELOGEAIS | THIERRY | 16 rue du Pressoir. 14140 LIVAROT. |
| LEMARCHAND | Pierre + Maryse | 43 rue Desseaux. 76100 ROUEN. (72.71.17) |
| MARTIN | Camille | 14 rue du Pré d'Auge. 14100 LISIEUX. |
| MARY | Paul | 348 rue Pablo Neruda. 76610 LE HAVRE. (47.13.33) |
| MENDES | Gérard + Christine. | 207 rue Saint Julien. 76100 ROUEN. |
| MICHAUD | Roger + Gisèle. | Rue de la Vallée. DELINCOURT. 60240 CHAUMONT EN VEXIN. (4. 449.03.82) |
| MICHEL | Pascal | 26 rue Richard Wagner. 76000 ROUEN LA GRAND MARE. (61.43.51) |
| MONTAGNE | Paulette | 5 boulevard de la Buffardière. 27000 EVREUX (33.21.94) |
| NICOLAS | Yves | 1737 Quartier du Bois. 14200 HEROUVILLE St CLAIR. |
| PELTIER | Nelly | 98 rue de Belfort. 76620 LE HAVRE. (44.49.41) |
| PERMANNE | Ernest | 9 rue Saint Etienne. 76400 FECAMP. (28.36.13) |
| POTTIER | Pierre + Claudine. | 21 allée des Roitelets. Quartier Réfigny 76190 YVETOT. (95.14.69) |
| POULAIN | Gunnel | 6 Bld Dumont d'Urville. "Les Moineaux" App. 12 76120 GRAND QUEVILLY. (68.73.34) |
| QUILLAUD | Pierre | 16 rue du Lieutenant de Vaisseau Paris. 76120 GRAND QUEVILLY. (6[illegible].[illegible]6.09) |
| RAULT | Andrée | 4 bis rue de Caumont. "Les Myosotis". 14100 LISIEUX (62.08.85) |
| ROUSSEAU | Henri | 46 Parc Viking. Allée des Platanes. 14920 MATHIEU. (94.67.63) |
| TAILPIED | Alfred | "La Marvento". HENNEQUEVILLE. 14360 TROUVILLE SUR MER (88.50.33) |
| VERON | Gaston | 8 place de la Petite Bruyère. 61700 DOMFRONT. |

oooooooooo

## LA ANTAÙULINOJ DE NIAJ MONAĤINOJ (sekvo) . ĈU ANĜELO , ĈU DIABLO ?

-Ambaùflankeco kaj konstanta oscil-ado inter Eva kaj Maria konceptoj : jen mezepoka sinteno survoje al pli ĝusta taksado virina.

La eklezio klopodas rangaltigi vir-inon, samtempe pluigante ŝian jar-centdaùran regatecon, laùopinie kongruan kun normala mondordo. Kanonjuro ne pridiskutas ambaùseksan egalrajtecon je spirita vidpunkto, sed precizigas, ke subula estas ina surtera loko. Ĉu ne vere, ke pro la prapeko, ino kondukis Kriston krucen? Pro tio ja humila ŝi devas aspekti.

Eĉ retropaŝante, kutimdevena juro en Bruĝo (XIV-a jarcento) allasas, ke edzo rajtas batpuni sian edzinon, ŝin tranĉvundi de kapo ĝis piedoj, kaj varmigi siajn piedojn ŝiasange ; leĝrompon li ne kulpas, kondiĉe ke li rekudru ŝin kaj ke ŝi tion post-vivu ..... Tamen samepoke notindas la fondiĝo de beginejoj (2000 en Kolonjo), duon-monaĥinejoj, duon-laborejoj, kie senhavulinoj sin viv-tenas.

Eĉ prostitutinojn oni ne taksas forperditaj knabinoj, sed misvojig-itaj ŝafinoj, rajtigitaj fondi korporacion. Dum konstruado de la dipatrina katedralo en Parizo, ili oferdonis monsumon por aĉeti ĉu pokalon altvaloran, ĉu vitralon. Jen embarasoplena kazo por la tiamaj klerikoj, kiujn, parenteze, oni pri-konsilis vigle imagi internaĵan inan putradon en okazo de amortent-iĝo ....

Aliflanke, iu nelacigebla, eĉ pli-iĝanta sorĉistina ĉasado respegul-as viran timon kontraù iaspeca ne-klarigebla, innatura mistero; ĝi estis kvazaù memdefenda reflekso, same kiel la tiel nomataj 'sorĉaĵoj" ofte nur konsistis el intervirina helpado sur kampo malkoncipa kaj abortiga. Ĉu,en ĉio ĉi-tio,ankaù ne enŝteliĝas ia kontraùstaro al la ĉiopotenca klerikaro ? Ĉiukaze, dum la XVI-a jarcento, sorĉistinaj pro-cesoj plinombriĝas tiagrade, ke iu abomeninda inkvizitoro fieras pro tio, ke li bruligis 900 laùdire kulpintinojn.

Prefere ni turnu nin al idilia portreto de Lutero pentrita : virino estas piema, al Dio res-pektoplena; ŝi uzas siajn manojn por hejme perlabori sian panon. Ŝi similas varŝipon alveturiganta komercaĵojn de malproksime. Kaj Kalvino aldone : viro ĉe oficejo, virino ĉe hejmforno : jen tia,devas esti burĝa vivregulo. Ĉu ĝi plaĉus al niaj plenliberem-ulinoj ?

*simone BONIOL* .

(daùrigota).

=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=

## KURSOJ : EN LE HAVRE :

tri membroj gvidas kursojn en la sidejo de ne-esperantistaj asocioj
unuagrada en la M.J.C. ĉiuĵaùde je la 19h (Sro CHALM)
unuagrada ĉe la asocio 'La Natur-amikoj" ĉiulunde je la 18h (Syvie CARON)
duagrada kurso en la sama asocio ĉiuvendrede je la 18h30 (P. MARY)
La grupo organizas konversacian kurson por siaj membroj kaj ĉiu persono deziranta sin perfektigi : ĉiumerkrede je la 19h en la liceo Porte Océane (A. CHALM)
Ni memorigas ke vi povas ĉeesti en la monata kunveno okazanta la 3an sabaton de ĉiu monato ĉe la ĉambro "François 1er" je la 17aH.

=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=

## J.E.F.O RENKONTIĜO EN BAR LE DUC

*LA 18 ' [illegible] an de MARTO 83 :*

*kun "[illegible]vala etoso" kaj renkon-tiĝo de gejunuloj.*

*INFORMOJ ALIĜILOJ :*

Lidja BLOCH, 11 rue des Ducs de Bar, 55000 BAR le DUC .

**********************************

1983 :ANNEE DE LA COMMUNICATION

LA SOLUTION MONDIALE : L'ESPERANTO.

**********************************

## LE HAVRE :

### MONATAJ KUNVENOJ :

MAJO : Sino Sery ĉarme igas nin iom pripensi pri "Kantoj". Franca filozofo diris "ridi estas homa esprimo"; oni povus aldoni : kan-to estas pra a esprimilo de homoj Kiam homo parolas, jam la tono es-tas ia harmonia sonĉeno. Religioj per-fektigis tiun ilon : certaj gre-goraj kantoj estas ensorĉigaj. Tamen, ĝia misuzo okazas : kiel plej bone vigligi trupojn ? per militecaj aŭ revoluciaj kantoj ! (tie ĉi ankaŭ estas atestaĵoj de eventoj en la historio) Aliflan-ke, en la ĉiutaga vivo, oni banas en maro de komunikiloj; radio-stacioj regule elsendas konsum-kantojn, plenaj je poezio kaj muziko harmonia ... Oni ĝenerale emas je kreaĵoj, kies temo estas amo, kaj ni revivigis ilin en la familia rondo. Kantoj evoluis : ili iĝis sengusta produkto de - aŭ por - rapide pasonta kantulo.

JUNIO : Laŭrenca: "Flegistino" mia metio. Tiu metio multe evoluis tamen, ĝi ĉiam estis ina aktiveco. De praa tempo ĝis mezepoko, la rolo de la virino estis mastruma-do kaj flegado. Poste, la konse-krita virino dediĉis sin al or-foj kaj malfeliĉuloj. Je la XIXa jarcento, la profesio aperis, la virino iĝis helpantino de la kuracisto. Deontologio indikas ke ŝi devas promocii sanon, mildigi suferon. Ŝi devas respekti la kon-viktojn de la malsanuloj; ŝiaj kvalitoj estas kompato, kompeten-teco, sindonemo. La unua formado daŭras tri jarojn; samtempeco inter kurso kaj praktikado ekzis-tas. Unua jaro .ĉirkaŭaĵo de plensanuloj, lernado de anatomio. Dua kaj tria jaroj : hospitalaj praktikadoj, malsanoj, apoteko. Post la kapableca ekzameno, la flegistino povas fakuliĝi : akuŝistino, vartistino.

SEPTEMBRO : "La Kultura Ensemblo Niemeyer": Sro Gibaux priskribas la konstruaĵojn kiuj anstataŭas la iaman teatron. Tiu revolucia arkitektaĵo estas kreita de Oscar Niemeyer, la fama konstruinto de Brazilia, kaj magiisto de la betono La rondaj elkreskaĵoj ĉerpas dina-mikon el la kontrastoj de la ĉir-kaŭa urba domegaro; ĝi konsistas el tri partoj : 1) Forumo : singu-lara placo je 3,7 metroj sub la stratnivelo, 2) Granda ŝelo, en kiu estas granda salono por vivan-taj spektakloj, Halo por ekspozi-cioj, kinejo, kaj diversaj lokaloj 3) malgranda ŝelo kun ĉambro plur-uza, aŭditorio, aŭdvida ĉambro kaj diversaj lokoj oj por provludoj. Al ĉio ĉi aldoniĝas du etaĝa aŭto parko por 500 aŭtomobiloj.

### GENERALA KUNVENO 16A DE OKTOBRO.

17 membroj ĉeestas kaj tri senkul-piĝas. Ni ĝojas saluti Sron Jean Boutin el Bolbec, malnova Samide-ano, kiu revenas al la movado.

Nia sekretariino resumas la agadon de l'jaro: ne gravaj aferoj, sed tamen daŭrigo de pluraj kursoj, inter kiuj unu por la Havra Sekcio de la Naturamikoj; 6 grupanoj ĉe-estis la reĝkukan feston en Yvetot 12 partoprenis en la Brita kongreso en Sotono, kaj 15 vizitis la U.N.E kongreson en Etretat. La monataj kunvenoj kontentige disvolviĝis kun meza vizito de 12 partoprenan-toj, malgraŭ la problemo de brua kunvenĉambro.

Nia kasistino trankviligas nin dank'al bonfarta kaso; la nuna malgranda aktiveco ne postulas gravajn ekspezojn ... sed tio ne daŭros.

Elektoj: La eliranta komitato estas reelektita unuanime. Oni povas bedaŭri ke la estrar-postenoj restas en la samaj manoj.

Projektoj : Kvar kursoj estas sta-rigitaj; krome daŭras privata instruado ĉe iuj membroj, aŭ per-korespondo. Reaktivigo de la skribinterrilatoj kun Sotono kaj Leningrado. Estigo de kaseoteko. Kontakto-informado al la lokaj deputitoj. Traserĉo de pli taŭga kunvenĉambro. Jara Festo: la 13a de marto... nu ! jen sufiĉe da pano sur la breto ! ...

*PROGRAMO de la paroladaj Temoj de la venontaj MONATAJ KUNVENOJ :*

.../...

NOV : Kodo kaj komunikado (Silvia)
DEC : Abundeca teorio (Paul Mary)
JAN : Teorio de Raël pri eksterteranoj.
FEB : Patriarkeco kaj Matriarkeco (Ĵibo).
MAR : Vojaĝo al Oriento :(Maurice Huet)
APR : Religioj (J;Colombel)
MAJ : Amnesty Internacia (Denise Noel).
JUN : Elekto pri metio (Janine Sery)

Esperiga aperitivo redonis forton al la ĉestantaro por la tutjara programo....

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

YVETOT :

Nova duagrada kurso rekomenĉiĝis la 23an de septembro en la M.J.C. ĵaŭde 17 h.. La ĝenerala kunveno de la grupo okazis la 27an de novembro kaj fiksis la daton de la reĝkuka festo je la 30a de januaro posttagmeze.
La 30an de aprilo kaj 1an de majo okazos junular-renkontiĝo en Yvetot Pluraj eksterlandanoj el Madagaskaro kaj Usono anoncis sian verŝajnan venon dum marto kaj majo.
Komence de septembro, juna Japanino, Fino Oŝiko Mijamoto, vizitis Finon Domingo en Le Trait kaj Gesojn Pottier. Vespere ŝi faris al kelkaj grupanoj demonstraciojn pri flora arto kaj pri diversaj aliaj tradiciaj japanaj artoj.

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

TROUVILLE :

*Kurso duagrada okazas ĉiu marde je la 17a en la Junuldomo. Ĝi estas gvidata de Sro Tailpied. 5 lernantoj ĝin partoprenas.*
*La estro de la M.J.C. interesiĝas pri Esperanto.*
*Sro Tailpied informas nin pri la forpaso de Sro Guitard el Trouville*
*Niajn amikajn pensojn al la familio*

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

Nia venonta estrara kunveno okazos sabaton la 23an de majo ekde la 14h ĉe niaj geamikoj : (atentu pri la nova adreso !).
Pierre QUILLAUD, 16 rue du Lieutenant de Vaisseau Paris. 76120 Grand Quevilly. Tel.: (35) 69.66.09

CAEN :

La 13an de novembro en la urba biblioteko de Caen, okazis ekspozicio de priesperantaj materialoj.
Interesiĝis pli ol 20 personoj post apero de artikolo en la lokaj gazetoj.
La 15an de novembro, du novaj serioj da ĉiulundaj por komencantaj kursoj ekiĝis :
- la unua, de la 15a ĝis la 16a en la universitato de la 3a aĝo, gvidata de Sro Angenault : ĉeestis 7 novuloj.
- la dua, de 17h30 ĝis la 18h30 en ejo de SNCF por ĉiuj, ankaŭ gvidata de Sro Angenault. Ĝin ĉeestis tri novuloj, krom deko da malnovaj grupanoj.
La 18an de novembro, Sino Alvarez ekigis kurson en la MJC de aparta kvartalo, sed nun tiu kurso okazas ĉiulunde de la 17a ĝis 18a horo en la stacidomo.
La 22an de novembro, loka libera radio : "radio Adel" (MF 104 Mkz) post antaŭa, longa intervjuo de esperantistoj, komencis elsendi ĉiulunde de la 19h30 ĝis la 20a kurson de Esperanto, muntitan de Sro Rousseau, kun kunlaboro de lia filino (virina voĉo) kaj sro Nicolas. Pluraj telefonalvokoj montris ke la okazaĵo interesas.
La kurso estas interpunktita de trafaj informoj kaj de esperantaj kanzonoj.
La 4an de decembro, la tutan posttagmezon, okazis en la M.J.C. de Hérouville Saint Clair, ekspozicio de esperantaĵoj, organizita de Sro Nicolas, same kiel la 5an de februaro en la "Salle polyvalente du Quartier du Bois".
Dum la vespera kunveno pluraj gejunuloj interesiĝis kaj eble kelk[illegible] sekvos kurson.

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

Pere de sro Martin el Lisieux, ni estis informitaj pri la forpaso de Sinjoro Henry ROCQUES, edzo de nia amikino Georgette Rocques, fine de oktobro. Ripozu pace, kara Henry ! Viaj amikoj neniam forgesos vin !

ooooooo

## ATENTU PRI L' ĈEVALO !

Mi aĉetis o ve ! la Trojan ĉevalon
Kaj nekonante l'riskon, ĝin igis en la hejmon !
Nun ĝiaj eliraĵoj, brilaj kaj allogaj,
Verŝas malamikon en la koroj infanaj .

Mi volis al gefiloj, belecon instrui,
Fierecon aprecigi, honestecon ŝatigi ! *apreci = ŝati.*
Sed la venena objekto, viglas ĉiutage,
Por dum tri horoj meze, aŭ du minimume,
Elmontri brutalecon, monavidon, senkompaton,
Ĉion abomenan : ŝtelon, trompon, murdon,
Samseksamo, feblecon, nenio por homojn formi, *febla = malforta.*
al nobleco, al braveco, pri honoro, des malpli !

Ĝi kontraŭiĝas al aĵoj sanaj kaj fortikaj,
Ĝi preferas malnormalon, verkon de cerboj tordaj !
Kiel proponi streĉon, sobrecon, kaj klopodojn ?
Kiel amigi tiujn, ne tuj videblajn bonojn ?
Kiam la facileco, de pasiva ricevo,
Tentadas ĉiuhore, en komforta brakseĝo ?

Vi komprenis verŝajne, ke tiu diabla ido,
Por mi troja ĉevalo, estas la televido !

CAEN 24. 12 . 1982
HENRI ROUSSEAU .

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

*Jen pensoplena poemo, ekle kelkaj ne konsentas pri ĝia enhavo : taŭga okazo por sendi viajn reagojn, kial ne sub formo poezia al nia redaktoro ........*

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## L'ESPERANTO FAIT SA RENTREE A L'UNIVERSITE DE HAUTE BRETAGNE

La langue internationale Espéranto est maintenant admise comme Unité de Valeur à l'Université de Haute Bretagne (Rennes II). Cette décision fait suite à un enseignement expérimental dont les résultats se sont révélés pleinement satisfaisants. L'initiative est due à M. André Rannou, maître-assistant d'anglais.
L'Université de Rennes est ainsi la 3ème de France à proposer l'espé-ranto comme U.V., après Clermont-Ferrand (1969, par Pierre Janton, professeur agrégé d'anglais, auteur du "Que-sais-je" n°1511 sur l' espéranto), et Aix en Provence (1970, Michel Duc-Goninaz, maître-assistant de Russe à l'Institut de Linguistique Générale et d'Etudes Orientales et Slaves, auteur d'un vocabulaire thématique d'espéranto paru aux éditions Ophrys, Gap.) Des cours ont lieu aussi à Lille III, dans le cadre de l'Education Permanente et de la Formation Continue.

*********

*Selon une information de SAT-AMIKARO*

## *PROPOSITION de LOI sur l'ENSEIGNEMENT de l'ESPERANTO dans les ECOLES*

"Une réunion sur ce sujet a eu lieu dans les bureaux de l'Assemblée Nationale le 8 février 1983.

Elle réunissait sous la présidence du député André DELEHEDDE, chargé des questions d'éducation et de langues au Parti Socialiste et rapporteur de la proposition de loi en cours sur l'enseignement de la langue internationale espéranto, 5 personnes bien connues dans les milieux espérantophones : Michel BOUCHEZ, secrétaire du groupe socialiste espérantiste du Pas de Calais organisateur de la réunion, Roland GRANDIERE, président de SAT-AMIKARO le professeur Pierre JANTON de l'Université de Clermont-Ferrand, qui a publié un "Que sais-je ?" sur l'Espéranto, Roland LEVREAUD, vice-président de l'Institut Français d'Espéranto, et Henri MASSON, secrétaire général de SAT-AMIKARO.

Au cours d'un intéressant débat de deux heures, André DELEHEDDE, au nom duP.S. a confirmé le désir de son parti de déposer une nouvelle proposition de loi qui, conforme à celle de la précédente législature, comporterait certaines modifications présentées au cours de la réunion par la délégation espérantiste.

Il s'agirait, en particulier, de permettre l'enseignement de l'espéranto non seulement dans le secondaire et le supérieur, mais aussi dans le primaire.

Des documents ont été remis par SAT-AMIKARO au rapporteur qui les annexera au dossier.

La nouvelle rédaction de la proposition de loi serait présentée en avril 1983.

La relance de cette action en faveur de l'étude de l'espéranto dans les écoles est en grande partie redevable à l'action des espérantistes auprès des députés et des ministères concernés, ainsi qu'au soutien apporté par l'Union des Travailleurs Espérantistes SAT-AMIKARO.

Des informations complémentaires seront diffusées au fur et à mesure du déroulement de la procédure"

SAT - AMIKARO .

********

## *SPECIAL POUR DéBUTANT :*

*vient de paraître :*

"FACILAJ DIALOGOJ" est un livret de 56 pages, format A5, qui comprend 12 dialogues faciles suivis de questions et de réponses didactiques, le tout avec traduction parrallèle en français.

Une cassette d'accompagnement comprend l'enregistrement de tous les textes en espéranto.

Le tout constitue pour un débutant un excellent outil d'étude ou de perfectionnement de la langue internationale espéranto.

Dans le livret, l'élève peut toujours avoir recours à la traduction en français pour lui faciliter la compréhension du texte.

Tandis que la cassette lui permet de se familiariser à la prononciation de l'espéranto, et ainsi apprendre à parler rapidement.

*Le livret "FACILAJ DIALOGOJ"*
*prix franco : 29 Fr.*
*La cassette d'accompagnement LG13*
*prix franco : 33 Fr.*

*Veuillez commander auprès de :*
*André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées*
*68390 BALDERSHEIM*
*CCP n° 819 34 U - STRASBOURG.*

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

## *"ŜLOSILAJ PERSONOJ"*

*La U.N.E.- Estraro decidis publikigi en tiu-ĉi numero (sur paĝoj 3 + 4) liston de "ŝlosilaj Personoj kiuj ricevas nian "Internan Cirkuleron".*
*Ili estas aktivuloj de la movado, kursgvidantoj, grupestroj, UEA-delegitoj, membroj de la estraro de U.N.E. aŭ de la Normanda Federacio de UFE, agemuloj....*
*Por pliaj informoj pri Esperanto kaj la E°-movado, vi bonvolu kontaktiĝi kun ili.*

Pour tout renseignement sur l'espéranto, et ses applications pratiques, veuillez contacter l'une des personnes, dont le nom et l'adresse se trouvent sur les pages 3 et 4 de ce bulletin : sous la rubrique : "ŝlosilaj personoj".

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

# LA ESPERANTISTAJ REVUOJ



*Voici quelques titres de journaux et revues auxquels vous pouvez vous abonner, parmi plus de 120 périodiques qui paraissent de par le monde en ou sur l'espéranto :*

* Par l'intermédiaire de : U.F.E. 4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS
C.C.P. n° 855.35.D Paris .

| | | |
|---|---|---|
| Franca Esperantisto | | 145,oo |
| Biblia revuo | | 40,oo |
| El Popola Ĉinio | 1 jaro | 26,oo |
| | 2 jaroj | 44,00 |
| | 3 jaroj | 65,oo |
| Dia Regno | | 48,00 |
| Esperanto Revuo (U.E.A.) | | 105,oo |
| Esperanto Dokumentoj | | 87,oo |
| Eùropa Dokumentaro | | 53,oo |
| Espero Katolika | | 60,oo |
| Fonto | | 103,oo |
| Franca Katolika Esperantisto | | 20,oo |
| Heroldo de Esperanto (16noj) | | 78,oo |
| Homo kaj Kosmo | | 12,oo |
| Internacia Pedagogia Revuo | | 40,oo |
| Kontakto | | 53,oo |
| U.F.E. : | Simpla membro | 50,oo |
| | Membro abonanto | 145,oo |
| | Dumviva membro | 2900,oo |

| | |
|---|---|
| Kulturaj Kajeroj Grésillon | 50,oo |
| Juna Amiko (infanoj) | 20,oo |
| La Ponteto | 12,oo |
| Lingvaj Problemoj Lingvo Planado (LPLP) | 62,oo |
| Literatura Foiro | 55,00 |
| Monato | 140,oo |
| Oomoto (Japana) | 40,oo |
| Scienca Mondo | 28,oo |
| Scienca Revuo | 75,oo |
| Planlingvistiko | 35,oo |
| Transalpa esperantisto | 35,oo |
| Koncize | 25,oo |
| U.E.A. : Membro kun jarlibro | 70,oo |
| - d° - +"Esperanto" | 175,oo |
| Dumviva membro | 4375,oo |
| TEJO : Membro + Jarlibro + "Kontakto" | 70,oo |
| Membro + Jarlibro + "Kontakto" +"Esperanto" | 175,oo |

* SAT, 67 avenue Gambetta 75020 Paris. C.C.P. Paris n° 1234.22 K.
Membreco + Sennaciulo 120,oo - d° - + Sennacieca Revuo 143,oo

* SAT-AMIKARO : André Sadier 22 av. P.V. Couturier, Bat.N.D. 93000 Bobigny
C.C.P. : Sadier, Paris , 7658.05.C.
Membreco + revuo 90,oo Subtenkotizo 180,oo
Gejunuloj ĝis 25 j. 45,oo

* Federation Espérantiste du Travail :179 rue ORDENER 75018 paris
C.C.P. : FET : Paris 902.52.F
Le Travailleur Espérantiste 35,oo Kotizo al FET 20,oo
Paco 50,oo Subtenkotizo al FET 75,oo

* Association Française des Cheminots pour l'E° 1 bis rue d'Athènes
75009 Paris ; C.C.P. : A.F.C.E. Paris, 7402.60.L
Esperanto fervojisto 28,oo Internacia Fervojisto 22,00

* HORIZONTO : 80,oo
Marie Thierry C.C.P. : 191 707 Z Rennes. 5 rue Cogniet 75017 Paris.

* LA MIGRANTO : 25,oo (Natur movado)
Gilbert Lebec 10 rue Jean Mermoz 94340 Joinville Le Pont.

* LA KANCERKLINIKO : 50,oo por 4 sinsekvaj numeroj
Jacques LE PUIL, 5 place Lavoisier, appt. 61 93380 Pierrefitte.
C.C.P. n° 12729 73 X Paris (Le Puil).

* I.C.E.M. - Esperanto 30,oo (Freinet movado) C.C.P.(ICEM) :
2224-93 Z Nantes.

* LAÙTE : 18,oo Cercle esperantiste de l'Agenais
47340 Maroque Timbaut. C.C.P. : 3.371.74 M Bordeaux.

* *Et naturellement* : UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. 283.40 H ROUEN. Trésorier : PIERRE LEMARCHAND. 43 RUE DESSEAUX 76100 ROUEN.

**DE LA 29A DE APRILO ĜIS LA 1A DE MAJO : KONVALA RENKONTIĜO !**

**YVETOT - GRUPO KAJ J.E.F.O.**

**(JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO)**

*Invitas vin partopreni internacian renkontiĝon en YVETOT !*
*Finfine "sentema" nur plezura renkontiĝo en ĉarma urbeto speciale bela printempe kiam floras la pomarboj !*

* VENDREDON la 29an de aprilo : Akcepto ek de la 18a H. en la junuldomo (Maison des Jeunes et de la Culture, avenue de Verdun. 76190 YVETOT. Telefono : (35) 95.51.01.)

* SABATON la 30an de aprilo : Vizito de la urbo.
 * kelkajn biciklojn ni havas surloke (se vi povas, kunportu la vian !)
 * Sro RAKOTONDRAVAO pelegas pri Madagaskaro
 * Distra vespero kun Feri-Floro (hungara kantisto) kaj Jak LE PUIL.

* DIMANĈON la 1an de majo :
 * Matene : kunsido de J.E.F.O.
 : piedpromenado al Allouville Bellefosse kun vizito de la miljara kverko.
 * Posttagmeze : Teatro kun TESPA.(Teatro esperanto de Parizo.)

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

**ESPERANTO RENDEVUO DE" LITERATURA FOIRO "**

**MESNIL SAINT PERE APUD TROYES**

**23-24 DE APRILO 1983**

*Tiu kultura semajnfino konsistos el tri grupoj :*

GROUPE "A" : pour les débutants :
Perla Ari-Martinelli animera un cours d'initiation à l'espéranto qui permettra d'assimiler les structures de base de la langue.

GRUPO "B" : por progresi en la lingvo.
Giorgio Silfer gvidos tiun grupon. La baldaŭ centjara lingvo konservis sian simplecon : (la 16 gramatikaj reguloj) sed profunde evoluis. Studo de tiu evoluo tra la literatura kaj parola uzoj.

GRUPO "C" : Lingvistika studgrupo.
Profesoro Waringhien honoros [illegible] operativon de L.F. per sia aktiva ĉeesto. Kun li, la partoprenantoj havos la privilegion diskuti pri vortaro : celo, konsisto, uzo, neologismoj, teknikaj terminoj...

VESPERE : kabaredo de TESPA : skeĉoj, kanzonoj, deklamoj sub la reĝisorado de Georges Lagrange.

Kromprogramo - programme complémentaire : 22-25-26-27an de aprilo.
Pliajn informojn kaj aliĝilojn - informations et adhésions :

Suzanne BOUROT , 15 B rue Morel-Payen, 10 000 TROYES.

************
******

*ALIĜILO resendota antaŭ la 10a de aprilo al Gesinsoroj POTTIER 21 allée des Roitelets 76190 YVETOT. Francio. Telefono : (35) 95.14.69.*

NOMO :  ANTAŬNOMO :

AĜO :

ADRESO :

Mi aliĝas al la "konvala renkontiĝo" 20 F.

Mi alvenos Vendrede Sabate Dimanĉe

Trajne aŭtomobile bicikle

Mi tendumos Mi deziras liton (en plurlita ĉambro)

20 F. por lito kaj matenmanĝo.

Mi manĝos vendrede vespere (20 F.)

sabate tagmeze (20 F.)

sabate vespere (20 F.)

dimanĉe tagmeze (30 F.)

Mi sendas al vi : ________ F. per ĉeko al "Centre culturel d'Esperanto d'Yvetot" (Poŝtĉekkonto : Rouen 1284.35.G.)

. Bonvolu tondi ĉi-tie kaj resendi .

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ONI POVAS AŬSKULTI RADION EN E S P E R A N T O EN LE HAVRE !

| | VINTRAJ DE LA | HOROJ ĜIS LA | ONDOLONGOJ (METROJ) | FREKVENCOJ (KHZ) |
|---|---|---|---|---|
| BERNE :Lunde, jaŭde, sabate | 19h00 | 19h10 | 75,28 | 3985 |
| | | | 48,66 | 6165 |
| Svisa Radio Internacia | | | 31,46 | 9535 |
| Esperanto Fako | 21h30 | 21h40 | 75,28 | 3985 |
| CH 3000 BERN 15 | | | 48,66 | 6165 |
| Svislando. | | | 31,46 | 9535 |
| PEKIN :ĉiutage | 21h00 | 21h30 | 30,10 | 9965 |
| | | | 26,21 | 11445 |
| | | | 19,80 | 15150 |

Radio Pekino
Esperanto Fako
PEKINO
Popola Respubliko de Ĉinio

*Ne hezitu peti de la Radio,programojn de la elsendoj. Eventuale skribu al mi pri viaj aŭdo-sukcesoj :*

Alain CHALM
8 place Albert René
76600 LE HAVRE.

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

BONVOLU NE FORGESI VIAN KOTIZON POR 1983 : 20.00 FR. : SUBTENKOTIZO EKDE 30.00 FR. UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE : C.C.P. ROUEN. 283 40 H. TRESORIER : P. LEMARCHAND 43 RUE DESSEAUX 76100 ROUEN.

*ANTAŬDANKOJN !* ...........

# K O N G R E S O 1 9 8 3

de Unuiĝo de normandaj esperantistoj, kaj de Normanda Federacio de U.E.F.

* *

Okazos en Hérouville Saint Clair, norda suburbaĵo de Caen, la 28-an kaj 29-an de venonta majo.

## Programo

**Sabaton 28-an de majo 1983:**

- 11.00 : Ekakceptado de la partoprenontoj
- 12.30 : Komuna manĝo
- 14.30 : Ekiro de la busa ekskurso al kaj en CAEN.
  ( Deĵorantaro daŭrigos la akceptadon )
- 19.30 : Komuna manĝo
- 21.00 : Distra vespero.

**Dimanĉon 29-an de majo 1983:**

- 10.00 : Ĝenerala Asembleo.
- 12.30 : Komuna manĝo.

Libera tempo

- 16.00 : Adiaŭa kafo.

Pliaj informoj dorse ...

---

# ALIĜILO

alla normanda esperanto-kongreso 1983, en HEROUVILLE SAINT CLAIR (Calvados)

N O M O :

A D R E S O :

---

I.- PARTOPRENANTOJ :

| | | |
|---|---|---|
| - Mi venos sola ☐ | | 1 persono |
| - Mi venos kun ☐ | plenkreskulo(j) | ... persono(j) |
| - Mi venos kun ☐ | infanoj (= malpli ol 15 jaroj) | ... persono(j) |
| | Sume | ... partoprenontoj |

II.- MENDITAĴOJ KAJ konsekvenca ŝulditaĵo: Vidu dorse .../...

Kongresejo: Centre International de séjour, 5.01 La Cité, 14.200 - HEROUVILLE SAINT CLAIR. Tel. : (31) 93.24.55
Busaj pasoj al Caen ĉiuj dek minutoj, linio 6. (aù 7)
Bonege ekipita nova konstruaĵego.

Ĉambroj: Povas esti laùelekto, unu-, du-, aù trilitaj. Oni pagas laù la nombro de personoj; vidu la prezojn sur la aliĝilo, ĉi sube.

EKskurso : Konsistos el busa vizito de Caen, intrepunktita de piedaj (etaj) marŝadoj, en la porpiedirantaj stratoj, kaj en la Abbaye aux Hommes.

Distra parto: Ni ankoraù ne povis fiksi ĝian konsiston.

---

| | Plenkreskuloj | | | Infanoj (=malpli ol 15 j.) | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | N. | Prezo | Produt | N. | Prezo | Produto |
| | | | a | | | b |
| - Aliĝkotizo | | 25 | | | 0 | |
| - Mi ne tranoktos en la kongresejo | | 0 | | | 0 | |
| - Mi tranoktos en la kongresejo | | | | | | |
| . Nombro da deziritaj litoj en unulita ĉambro | | 63 | | | 53 | |
| . Nombro da deziritaj litoj en du- aù trilita ĉambro | | 53 | | | 43 | |
| - Mi (Ni) tagmanĝos sabaton 28-an | | 30 | | | 25 | |
| - Mi (Ni) vespermanĝos sabaton 28-an | | 30 | | | 25 | |
| - Mi (Ni) tagmanĝos dimanĉon 29-an | | 35 | | | 25 | |
| - Mi (Ni) partoprenos la sabatan ekskurson | | 10 | | | 0 | |
| SUME, a + b ........ | | | | | | |

Mi sendas ĉi kune pagon de tiu sumo al S° Gilbert ANGENAULT, 23 route d'ASNELLES, 14.114 - VER SUR MER. Ĉekoj estu je nomo de "Union des esperantistes de Normandie, CCP ROUEN 28340 H.

Subskribo: